

Heinrich Heine,

## En Majo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

En Majo, kiam ĉiuj  
Burgonoj malfermiĝis,  
La amo kiel floro  
En mia kor' estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj  
Birdetoj sin aŭdigis,  
Al ŝi deziron mian  
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982-11-14.*

MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.*

Heinrich Heine,

## En admirinde bela maj'

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

En admirinde bela maj',  
dum jam burgonoj krevis,  
jen ankaŭ miakore  
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj',  
dum birdotril' senbridis,  
jen mi al ŝi sopirojn,  
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.*

Heinrich Heine,

## En la mirinda bela Maj'

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

En la mirinda bela Maj',  
dum sin burgonoj fendis,  
en mia kor' la amon  
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj',  
dum birda tril' ne ĉesis,  
al ŝi sopiron mian  
konfide mi konfesis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 - †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)